# Habanos: la neceso protekti la kubajn cigarojn kontra? falsigoj




Specialistoj de la kuba entrepreno Habanos S.A anoncis ke nova hologramo de sekureco estos disponigata al la kubaj cigaroj de la marko *Cohiba Behike*, kio kontribuos redukti la konstantan falsigadon altrudatan al tiu produkto kuba.
Tia sistemo permesos ke la kuba cigaro estu identigita en kiu ajn parto tra la tuta mondo kaj donas plian informon pri la distribuanto, la numero de fakturo kaj aliaj detaloj.
La? la specialistoj de la entrepreno, kiu respondecas pri distribuado kaj komercigo de tiu marko en pli ol 150 landoj, kie ili estas konsiderataj la plej bonaj cigaroj je monda skalo, la tri formatoj BHK 52, BHK 54 kaj BHK 56 aldonos iompostiome tiun ?i novan hologramon en la cigar-ringo.
Dum la venontaj monatoj ankora? la malnova identigo kunekzistos kun la nova en la vendejoj; la tradiciaj prezentitaj en 2010 posedas kapon de indiano Cohiba en la holografia papero reliefe stampita, krom la ekskluziva hologramo de sekureco.
*Cohiba* estas la marko pli reprezenta de la kubaj cigaroj kaj estis kreita en 1966, ?ia nomo devenas de la tainaj indi?enoj kaj rilatas al grapolo de folioj uzitaj tute nature en Kubo, temas pri la unua formo konata de kubaj cigaroj ekde la epoko de la hispana koloniado.
La insulo produktas jare tre limigitan kvanton de tiu marko pro tio ke estas ligita al diversaj faktoroj kaj la kondi?oj de esceptaj folioj. Spite al la negativaj efikoj de la ekonomia financa krizo internacia kaj la kampanjoj kontra? tabakfumado, anka? enlande, Habanos S.A enspezigis al la insula ekonomio pli ol 400 milionojn da dolaroj en 2013, kio superis la atenditajn rezultojn.
La ?efaj merkatoj de la kubaj cigaroj estas en landoj kiel Hispanio, Francio, ?inio, Germanio, Svislando,

Kubo, Libano kaj la Arabaj Unui?intaj Emirlandoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/25359-habanos-la-neceso-protekti-la-kubajn-cigarojn-kontrau-falsigoj

**Radio Habana Cuba**